komplimenton pri la sano:
Vidi vin kaj ne admiri
povus nur vegetarano!

Vi aspektas fenomenaj
pri-malmanko-atestaĵo,
kie ĉio estas plena —
speciale la korsaĵo.

Apud la fadenfiguroj
de tro longa fast-epoko
viaj gasbalon-konturoj
havas guston de provoko!

Se vi amas, mi supozas,
ke vi amas nur pogrande.
Vi ne per kulero dozas,
sed abundas tuj ĝisrande!

Por tarifi vian flamon,
oni pes-unuo prenas
la normalan kilogramon,
kaj el tio mi komprenas,

ke posedi vian koron —
kun konvena aldonparto —
reprezentus la valoron
de tutjara viandkarto.

Mi rezignas konsekvence
pensi plu pri am-propono,
kaj mi petas nur, kompanse,
ŝaf-kotleton . . . sen kupono.

Rimletero al “Amerika Esperantisto”

Mia kara redaktoro,
Mi gratulas vin el koro.
La gazeto estas bela,
La enhavo tre fabela.
Nun alvenos la abonoj:
Centoj, miloj, milionoj.
Aŭ ĉu tion mi nur revas?
Propagandi ni nun devas.
Ĉiuj sekvu vian peton:
Ili montru la gazeton
Al najbaro, amikino,
Samklubano, bopatrino.
Bibliotekojn enlistigu
Kaj vendejojn tuj instigu:
Ĉiuj devas vendi, vendi,
Centojn da abonoj mendi.

Tiel kreskos la movado
Kaj turniĝos ĉiu rado.
Urgas tempo. Propagando
Estas grava en la lando.
Ĉie sonu nia kanto
Pri la lingvo Esperanto.
Mi ĝin diras aĉe, plaĉe,
Facilstile kaj rimaĉe.
Vi ne perdu la humoron,
Sed daŭrigu la laboron.
Mi nun restas kun gratulo
Kaj salut’

Babi le Mulo.

★

(El diversaj landoj venas laŭdoj pri AE.
Supre estas unika ekzemplo en rimo.)

SUPERSIGNITAJ LITEROJ EN ESPERANTO

PASTRO AUSTIN RICHARDSON

Antaŭe Profesoro en la Instituto St. Louis, Bruselo

En ĉiu lingvo ekzistas kelkaj sonoj, kiuj, ne malfacile elparoleblaj, troviĝas en multaj lingvoj, pli malpli en ĉiuj lingvoj, kaj tial povas esti konsiderataj kiel internaciaj. Tiaj estas la sonoj, kiujn la angla lingvo figuras per la literoj "ch", "j", "sh", "ts", kaj "z" en "azure." Necese estis iel reprezenti tiujn internaciajn sonojn en Esperanto. Sed kiel? Oni povis figuri ilin, aŭ per unuopaj literoj, aŭ per duopaj aŭ triopaj. Kiun manieron elekti? D-ro Zamenof, inspirita de tiu mirinda prudento praktika, kiun li tiel eminente posedis, elektis la unuan metodon, kaj figuris ĉiun el tiuj sonoj per unu sola litero. Se li estus elektinta duopajn aŭ triopajn, tiuj kunmetoj de literoj havus diversan valoron ĉe diversaj lingvoj. Ekzemple, vidu "ch". Angle tiuj duopaj literoj havas la sonon, tre konatan *de Angloj*, ĉe la vortoj "child", "church", sed france tiu sama "ch" havas la sonon de nia angla "sh". Ekzemple, "chat". "chambre". France, la angla "ch" estas reprezentata per "tch", ekz. "tcheque". Kaj tiel plu ĉe aliaj lingvoj.

Nia majstro do saĝege elektis figuri tiujn sonojn per la literoj: c, ĉ, ĝ, ĵ, kaj ŝ. Nun necesas nur, ĉe ĉiu nacia lernolibro, doni al lernanto la sonon de ĉiu el tiuj literoj en lia propra lingvo. Tiel niaj anglaj lernolibroj instruas ke *c* estas elparolata kiel "ts" en "bits", *ĉ* kiel "ch" en "church", *ĝ* kiel "g" en "gem", kaj *ŝ* kiel "sh" en "ship". Franca lernolibro instruas ke *c* estas elparolata kiel "ts" en "tsar", *ĉ* kiel "tch" en "tcheque", *ĝ* kiel "dj" en "adjutant", *ŝ* kiel "j" franca, *ŝ* kiel "ch" en "chat". Kaj tiele ĉe aliaj lingvoj, en la mondo.

Sed eble la ĉefa pravigo de la uzado de la supersignoj estas . . . ke la supersignoj estas tre utila rimedo por kombini la "grafismon" kun la "fonetis-

mo". Alivorte, radiko kiu *sen* supersigno estas facile rekonebla jam por multaj milionoj da homoj pro sia *skriba* simileco al siaj diversaj naciaj formoj fariĝas kun supersigno, rekonebla por ankoraŭ pluaj milionoj, dank' al la *sona* simileco, kiun tiu supersigno al ĝi aldonas. Ekzemple, per la radiko *ciel* oni atingus per la grafismo (aŭ litersimileco) 125,000,000 da personoj, ĉar la Francoj, la Hispanoj kaj la Italoj donas al tiu ĉi vorto la saman ortografion, se ili ne donas al ĝi la saman elparolon. Sed anstataŭ *c* metu *ĉ* kaj ne perdante la 125,000,000 homojn akiritajn per la grafismo, vi atingas pli plene 35,000,000 per la fonetismo aŭ sonsimileco. Dank' al tiu *ĉ* ja nun ne estas plu, inter la elparolo de *cielo* itala kaj de *cielo* Esperanta, io alia ol diferenceto tre malgranda. Alia bona ekzemplo estas la radiko *ĝarden*. Se por tiu ideo oni prenus la radikon *garden*, oni per ĝi atingus jam la 125,000,000 personojn, kiuj uzas la anglan lingvon. Sed ĉar de la angla vorto *garden* diferencas la germana vorto *garten* nur per la litero *t*, oni praktike atingas ankaŭ la homojn, kiuj uzas la lingvon germanan, entute do nun 215,000,000 da individuoj. Sed se al la *g* en *garden*, ni nun almetas supersignon kaj skribas *ĝarden*, ni tuj, konservante samtempe la skriban similecon de la vorto por la angloj kaj germanoj, faciligas la vorton por la francoj, ĉar fonetike *ĝarden* kaj *jardin* estas tre similaj, t.e. 55 milionojn da homoj. Sed tio ankoraŭ ne estas ĉio. La Italoj ja skribas *giardino*, sed ili elparolas *ĝardino*, tiamaniere ke la Esperanta vorto *ĝardeno* estas tre simila, laŭsone, al la itala.

Ankaŭ argumento por la supersignitaj literoj estas, ke ili estas tre belaj por la vido. Oni ne devas maleslimi tion, kion france oni nomas

“l’effet graphique”. La ofte ripetitaj “ch” kaj “sh” estas tre malbelaj. Ili estus tolereblaj nur ĉe vortoj, en kiuj ni kutimas vidi ilin en nia nacia lingvo. Ekzemple, por angloj, en “ship, chain”, k.t.p. Sed la anstataŭigo de tiuj kombinaĵoj en Esperantaj vortoj, kie ili ambaŭ ofte devus aperi du- aŭ trifoje en unu vorto, estus tre malgraba por la okulo. Ni ne povas dubi, ke tio estas precize la kaŭzo kiel iu malamiko de nia kara lingvo klopodas por forigi tiujn supersignitajn literojn, ĉar li scias, ke se oni forigus ilin, necese estus (por forigi tiun malbelecon) tute revoluciigi la vortaron, eĉ efektive elpensi novan lingvon, *kaj tio estas precize lia celo.*

Nun kio estas la sola efektive praktika argumento kontraŭ la praktika

kaj prudenta metodo de nia Majstro? Nur tio ĉi: ke la plimulto da presistoj ankoraŭ ne havas tiujn literojn, kaj ke la kompostistoj tute malplaĉas supermeti akcentojn super siaj nunaj presliteroj. Sed ĉu estas prudenta—ne, ĉu ne estas infana—por tia *nedaŭra* malfacileco, voli forigi econ tiel gravan, tiel necesan? Ke jam en tre multaj lokoj multaj presistoj havas tiujn literojn, provas la grandega literaturo Esperanta, ĉu gazeta, ĉu libra. Plue se nia kara lingvo daŭrigos progresadi—kio estas certega—*ĉiuj* presistoj volas kaj devas posedi tiujn kvin supersignitajn literojn, tiel, kiel ili jam posedas la multe pli multajn supersignitajn literojn, francajn, germanajn, hispanajn, k.t.p.

—El “*The British Esperantist*”

LA ESPERANTO-STUDANTO

Esperanto is always pronounced just as it is written. The vowel sounds a, e, i, o, u, may be indicated by the vowel sounds heard after “b” in the English words; *bar, bear, bier, bore, boor.* Esperanto “e” and “o” have no exact equivalent in English: “e” is similar to the “a” in “chaos”, and the “o” to “o” in “obey”, both pronounced rapidly. Be careful not to drawl these sounds out as we do in English.

En la Butiko

En la butiko estas multaj objektoj: libroj, cigaroj, cigaredoj, horloĝoj, ĉokolado. La eleganta sinjoro staras en la butiko kaj rigardas la objektojn. Alia sinjoro, la vendisto, diras al li: “Bonan tagon, Sinjoro! Kion vi deziras?” La eleganta sinjoro montras al la horloĝoj: “Mi deziras aĉeti novan horloĝon. Kiom kostas la malgranda ora horloĝo?”

“Ho, la ora horloĝo estas ja la plej bona — kaj ĝi kostas *nur* kvin dolarojn!” respondas la vendisto.

“Kvin dolarojn! Ĝi estas sufiĉe multekosta . . . sed mi bezonas novan horloĝon. Tre bone, mi aĉetos ĝin.” La sinjoro donas la monon al la vendisto, li pagas lin, kaj do la vendisto vendas la horloĝon al la eleganta sinjoro.

In the Store

In the store are many objects: books, cigars, cigarettes, clocks, chocolate. The elegant gentleman stands in the store and looks at the various objects. Another gentleman, the salesman says to him: “Good Day, Sir! What would you like?” The elegant gentleman points to the clocks: “I wish to buy a new clock. How much does the small gold clock cost?”

“Oh, the gold clock is indeed the best — and it costs *only* five dollars!” answers the salesman.

“Five dollars! It is quite expensive . . . but I need a new clock. Very well, I will buy it.” The gentleman gives the money to the salesman, he pays him, and so the salesman sells the clock to the elegant gentleman.

LA RENKONTO

Franca humoraĵo de ALPHONSE ALLAIS

Alphonse Allais, franca literaturisto, 1854-1905, verkinto de multe ŝatitaj humoraĵoj.

Georges Auriol, franca literaturisto kaj desegnisto (1863) verkis humoraĵojn kaj distingigis en ornama arto.

Antaŭ kelkaj jaroj, mia amiko Georges Auriol kaj mi, troviĝis sur la teraso de la Kafejo d'Harcourt. Ni sidiĝis ĉe tablo najbara de alia, kie iu sinjoro trinkis glason da biero.

Ĉar estis varme, tiu ĉi sinjoro deprenis la ĉapelon kaj metis ĝin sur seĝo. Je la fundo de la ĉapelo, mia amiko Georges Auriol povis ekvidi la nomon kaj adreson de la ĉapelisto: P. Savigny, Rue du Marché, Tréville-sur-Meuse.

Kun seriozeco kiun li rezervas ekskluzive por tiaspecaj entreprenoj, Auriol fikse rigardis nian najbaron, poste diris tre ĝentile:

“Pardonu, Sinjoro, ĉu vi ne venas el Tréville-sur-Meuse?”

“Certe?” respondis la sinjoro, serĉante rememori pri Auriol.

“Ha!” diris tiu ĉi, “mi estis certa ne erari. Mi iras ofte en Tréville. Mi eĉ havas tie bonan amikon, kiun vi eble konas, iun Savigny, ĉapelisto, en la Rue du Marché.”

“Ĉu mi konas Savigny! . . . Sed mi bonege konas lin! Vidu,

estas li kiu vendis al mi tiun ĉi ĉapelon.”

“Ha, vere?”

Ĉu mi konas Savigny! . . . Ni konas unu la alian de kiam ni estis knaboj, ni iris en la saman lernejon, mi vokas lin Paŭlo, li vokas min Ernesto.”

Kaj Auriol ekparolis senfine kun la alia pri Tréville-sur-Meuse, loko kies nomon mia amiko Georges Auriol, eĉ ne konis antaŭ kvin minutoj.

Sed mi, ĵaluzo pri la sukceso de mia kamarado, decidis pligrandigi lian malgrandan ŝercon kaj lin paligi pro envio. Rapida rigardo en la fundon de la fama ĉapelo rivelis al mi la ĉefliterojn de la nomo del' posedinto. Du minutoj pasigitaj apud la Bottin-Adresaro de la kafejo sufiĉis por konigi al mi la kompletan adreson de Sinjoro E. D. H.

Komercistoj: Duval-Housset. (Ernest) . . . k. t. p.

Kun kvieta sinteno mi venis residiĝi kaj miavice fikse rigardante la sinjoron el Tréville mi diris:

“Senkulpigu, se mi eraras, Sinjoro, sed ĉu vi ne estas Sinjoro Duval-Housset, komercisto?”

“Tre vere, Sinjoro, mi estas Ernest Duval-Housset, via servanto.”

Certe Sinjoro Duval-Housset estis mirigita esti rekonata de du individuoj kiujn li neniam renkontis, sed estis ĉefe la mirego

de Auriol kiu estis preskaŭ freneza. Per kiu sorĉo mi do povis diveni la nomon kaj profesion de tiu ĉi komercisto de alkoholaĵoj?

Mi aldonis: “Ĉu estas ankoraŭ la patro Roux, kiu estas urbestro de Tréville?” (Mi rapide estis leginta en la adresaro tiun ĉi nomon: Urbestro: D-ro Roux, patro).

“Ve, oni enterigis la karan homon antaŭ tri monatoj.”

“Nu, nu, nu! Estis vere tre bona homo kaj plie, bonega kuracisto. Kiam mi grave malsaniĝis en Tréville, li kuracis min en malpli ol dekkvin tagoj.”

“Oni ne rapide anstataŭas tian viron!”

Auriol tamen fine divenis mian ruzajon, li ankaŭ foriris, baldaŭ revenis kaj nia interparolado daŭrigis pri Tréville kaj ĝiaj loĝantoj.

Duval-Housset ne plu kredis siajn orelojn. “Mil tondroj!” li ekkriis. “Vi konas la loĝantojn de Tréville pli bone ol mi, kiu tie naskiĝis kaj kiu tie loĝas de 45 jaroj!”

Kaj ni daŭrigis: “Robert, la tranĉilfaristo, kiel li fartas? Kaj Durandeau, ĉu li estas ankoraŭ bestkuracisto? Kaj Vidvino Ledebel? Ĉu estas ankoraŭ ŝi, kiu mastrumas la Hotelon de la Poŝto?”

Fine, la du folioj de la adresaro pri Tréville estis uzitaj (Auriol, moderna vandalo, estis akirinta ilin per lerta eltranĉo kaj malavare donis unu al mi).

Duval-Housset, feliĉege pagis al ni glasojn da biero —, ho, tre rapide trinkitaj! Ĉar estis varme (ĉu mi diris tion supre?) kaj nenio soifigas pli ol paroli pri urbo kiun oni neniam vidis.

La festeto finiĝis per bonega vespermanĝo kiun Duval-Housset oferis al ni. Oni trinkis je la sano de ĉiuj samurbanoj de nia nova amiko kaj vespere ĉirkaŭ meznokto, se iu estus pretendinta al Auriol kaj mi, ke ni ne estis amikoj kun la tuta loĝantaro de Tréville-sur-Meuse, tiu persono estus havinta tre malbonan akcepton.

— Trad. R. R.

FONETIK ETHIX

How rich the English language is
With three and forty sounds or more;
But six and twenty letters must
The task perform to spell them o'er!

Phonetic rules are ne'er observed;
The only letter in the list
That varies not is v, and yet
From 'of' one finds the v is missed.

Four hundred different ways are used
A half a million words to spell,
So buckle down and study long
Of course you'll learn them all real well.

Fonetik ingliš ŝoz ju haŭ
Eksidin kŭir aŭr lengŭeĝ luks;
Tu mend ic form iz hoplis naŭ,
Lec studi Esperanto buks.

Jes, studu Esperanton nun
Ĉar literumi povos vi
Post unuhora bela task',
Prononci ankaŭ kiel ni.

—Charles H. Briggs.

(Mch has bn wrtn abt rfrmd splng.
F a systm f abbrvtns wr adptd, 40 pct f
spc cld b savd. *Tb Edtr.*)

ESPERANTA KRONIKO

Chong Yeong Lee, eminenta Korea Esperantisto: En la Nov-Dec numero de "AE", 1957, ni presis en paĝo 136 pri "*Leŭtenanto Esperanto*", kiel la kun-oficiroj en la Sud-Korea Armeo nomis *Chong Yeong Lee* pro lia entuziasmo kaj kapablo pri Esperanto. Post la milito, li troviĝis en Chung-gu Universitato en Taegu, kiel Help-Profesoro kun *Prof. Hengwi Hong*, alia bonkonata Esperantisto, kie li instruis en la Departemento de Komerco. Interese estas, ke la Prezidanto de Chung-gu Universitato, *Hae Chung Choi*, estas ankaŭ Esperantisto, kaj Prezidanto de la Korea Esperanto-Instituto. *Chong Yeong Lee* estas Ĝenerala Sekretario de la K. E. I. Li estas sendita por studado en Universitato Nov-Jorko, urbo Nov-Jorko, kaj survoje li restis iom da tempo en Havajo, kie li parolis al gestudentoj pri Esperanto en la plej granda alternejo en Havajo, la Kamehameha Lernejo. Proksimume 300 gestudentoj aŭdis lin, ĉiufoje dum tri paroladoj je la 16-a de februaro, 24-a de februaro, kaj 1-a de marto. La lernejo nun planas regulan Esperanto-kurson. "Leŭtenanto Esperanto" tre honoris nin, Ges-rojn Connor, per deturniĝo al Portland survoje al Nov-Jorko de San Francisko, por esti nia kara hejmgasto je la 4-a kaj 5-a de junio. Li estas tre afabla samideano kaj bonega reprezentanto de la Sud-Korea Esperanto-movado.

Sciencisto Elliot Q. Adams, Maple Heights, Ohio, honor-membro dum pli ol 20 jaroj, prezentis paroladon en aprilo ĉe la kunveno de la *Societo Optika de Ameriko* en Dallas, Texas, pri "*La Rolo de la Y-Kromosomo en Kolor-Blindeco*". Survoje al Dallas, li vizitis parencon en St. Louis.

Esperantista Rekordo de Wm. P. Vathis, Usona Konsulejo, Meksiko: Notinde estas, ke je la 19-a de aprilo, 1965, samideano Vathis markis sian 30-an jaron de Esperantista vivo. Li lernis Esperanton kiam li havis nur 15 jarojn, en Mauch Chunk, Pa., kaj tuj aliĝis al EANA. Dum ĉiuj 30 jaroj, seninterrompe, li pagis la kotizojn — ofte kun aldonaj kontribuoj kaj kiel Patrono. Ankaŭ li ĉiam membrigis siajn familianojn. Ja mirinda rekordo, kaj ni kore salutas lin je la 30-jara datreveno.

Samideano Herman H. Brinkman, Westerville, Ohio — Post ni skribis pri la Esperantista rekordo supre, ni rimarkis, ke sufiĉe multaj membroj de EANA Esperantistiĝis tre frue. Ekzemple, samideano *Brinkman* skribas: "Mi estas leginta Esperanto-gazetojn dum multaj jaroj. Mi komencis legi ilin kiam Arthur Baker estis redaktoro de *Amerika Esperantisto*." Tio povas esti dum preskaŭ 60 jaroj! Ni petas, ke S-ro Brinkman kaj ĉiuj pioniroj en EANA sendu iliajn rekordojn kaj spertojn por "AE".

S-ino F.H. Schwarz vizitis Aŭstrujon kaj pasigis dek monatojn en tiu bela lando. Dum ŝi estis en Vieno, ŝi vizitis la grandan bibliotekon de la *Internacia Esperanto-Muzeo* kaj intervjuis la fondinto-direktoron, *Kortega Konsilisto Hugo Steiner*.

Samideano Thomas H. Goodman, instruisto de lingvoj en Baltimore, Md., pri kiu ni presis en Jan-Mar "AE", jam efektiviĝis sian deziron starigi Esperanto-grupon de studentoj en sia lernejo. Ili utiligas la librojn "Esperanto: The World Interlanguage" kaj "Say It in Esperanto". Ili kunvenas ĉiumarde post la klasoj. Ni ricevis belan bildon kaj priskribon pri la grupo, kaj esperas presi ilin en posta eldono de "AE".

D-ro Melvin J. Frost, longtempa kaj altestimata samideano en EANA havas novan postenon en la *Dept. of Geography, Arizona State University, Tempe, Ariz.* Li ŝatus konatigi kun Esperantistoj en Arizono.

Rev. M. Whipple Bishop, pastro de la *Unity Church of Leisure World*, revenis post bela vojaĝo al la Mediterano kaj Proksima Oriento, al sia ofico en Kalifornio, sed al nova strat-adreso jene: *13540 El Dorado Dr. 48-D, Seal Beach, Calif. 90740.* "Bonvenon hejme."

D-ro Daniel Howard, Windsor, Conn., devas ĉesi pri Esperanto je la aĝo de cent jaroj! Iama administranto en la Konsilantaro de Edukado, li fariĝis emerito, sed ne pri Esperanto. Sendube li estas la plej aĝa membro de EANA. Frances Kleinman skribis por li, ĉar li nun estas iom blinda kaj surda. Ŝi diris: "Li estas glora kaj mirinde bona centjarulo, kaj ĉiam tre interesiĝis pri Esperanto." Ni ame salutas lin.

La Societo de Intelektaj Amikoj estas nova organizo en altlernejo, kiu havas *Brady W. Moore III, Mars, Pa.*, kiel prezidanto. (Vidu anoncon en Dez. Kor.) Estas jam 15 membroj, kaj ili publikigas bultenon 3-paĝan per mimeo aŭ skribmaŝino. Artikoloj ĝis nun pri botaniko, metafiziko, historio, ktp. Oni planas publikigi ĉion en Esperanto kiam tio ebligos.

John & Erma Hutchens, Canton, Ohio, multe helpas al Esperanto. Ili ambaŭ membriĝis dum multaj jaroj, kaj 'Johano' estas PATRONO seninterrompe depost 1958. John, kiu instruas en la lernejoj de Konteo Stark, jam delonge propagandas per pamfletoj pri Esperanto inter studentoj. Li instruis dum 59 jaroj kaj ankoraŭ servas kiel anstataŭanto en lernejoj, kie li ĉiam estas tre bonvena. Foje li ricevis 7 alvokojn, sed kompreneble povis akcepti nur unu. Tio ja multe atestas pri li.

Mrs. Sally Maurer, Head of Foreign Languages in Lincoln Jr. High School, Illinois, nun utiligas la libron de Montagu Butler, "Esperanto for Beginners", kiel oficialan lernolibron por mallonga kurso en Esperanto. Tridek kvin studentoj, kiuj jam studis iom da latina kaj franca lingvoj, nun certe facile kaj ĝoje lernas Esperanton. Ni rekomendas la libron de Butler kiel tre taŭgan mallongan kurson.

Mrs. Robert McMaster estas ne nur kompetenta pri la progresigo de Esperanto en sia propra Kalifornio, sed sendas propagandilojn tra Usono. Ŝi jam altkvalite mimeografis du bonajn foliojn kaj ilin dissendis, nome "Let Us Communicate" kaj "Excerpts from Encyclopedias".

Ni funebras: *Hans B. Julow*, South Hadley, Mass., 78-j., mortis la 2-an de aprilo pro apopleksio. Li estis membro ekde la plej fruaj tagoj de EANA, kaj amata de la tutlanda Esperantistaro. Ni perdis tre fidelan samideanon. — *Konrad Kail*, Spencer, Ia., mortis en februaro aŭ marto. Li estis Esperantisto en la plej fruaj tagoj dum li estis studento en meza Eŭropo. "Kon" estris la EANA-Kongreson en Spencer en 1951. — *Markian A. Stanko*, Los Angeles, Calif. Ni ne havas detalojn. Li estis Dumviva Membro de EANA, kaj bone scipovis Esperanton, eble de antaŭa loĝado en Eŭropo. — *Miss May D. Van Sloun*, San Francisco, Calif. Ŝia gazeto revenis en januaro, markita "deceased". Ŝi estis pioniro de Esperanto, kaj ĉiam plej fidela membro, kiel frazo en letero dum 1956 atestas: "*I cheer for OUR side.*" Ŝi kontraŭstaris la skismon en la usona movado.

KRONIKO PRI KEBEKO KAJ KANADO

Esperanta Aktiveco en la Bela Lando Kebeko: Vidu paĝon 37 pri granda nombro de sukcesintoj pri Esperanto-diplomoj por EANA-membroj en Kebeko. Krom notoj tie pri *Fr. Henri Bolduc, Vincent Beaupré, Jacques Gaucher, Lucien Coallier, Frank J. De Kinder*, k.a., ni aldonas, pro manko de spaco, nur kelkajn pliajn notojn pri aliaj. *Emile Froment* (St. Leonard) legas 6 lingvojn, havas librojn kaj gazetojn en 144 lingvoj el 68 landoj; *Rev. Leo Grégoire, v. Dei* (Trois-Rivières) el Roberval al nova posteno; *Brian D. Kaneen* (Burnaby, B.C.) el urbo Kebeko al posteno pri modernaj lingvoj en Universitato "Fraser". *J.A. Freddy Masson* (Montmagny) en la "Club du Ruban Sonoro".

Kebeka Esperanto-Klubo gastigos Kanadan Kongreson: Dum la 2a, 3a kaj 4a de julio okazos Kanada Kongreso en la urbo Kebeko sub la aŭspicioj de la Kebeka Klubo. Tri tagoj de ĝojo kaj samideaneco. Dum ĝi spegulas la tut-Kanadan Esperantistaron, oni deziras kaj bonvenigos samideanojn de ie ajn. Bonege estos se multaj usonaj Esperantistoj ĉeestos. Ni rekomendas, ke kiel eble plej multaj partoprenos el Usono. Ĉu tut-Kebeka, tut-Kanada, aŭ tut-Amerika Kongreso, ni povas certigi pri la bonkoreco kaj gastameco de la Kebekanoj, pro nia EANA Kongreso tie je 4-7 julio, 1958, sub gvidado de Jacques Gaucher kaj la tiama Kebeka Esperanto-Klubo. Senprokraste petu la detalojn kaj registru vin ĉe *F-ino Marcelle Aubé, 139 Crémazie West, Québec 6, P.Q., Canada. Prezidanto Henri Brunelle* kaj la klubanoj kore invitas vin.

Kanadaj Membroj de EANA ekster Kebeko: Dum ni fieras pri niaj membroj en Kebeko, ni ankaŭ fieras – kiel tut-Amerika Esperanto-Asocio – pri membroj en anglolingva Kanado. Antaŭ ol presi pri nur kelkaj ekzemploj de elstaraj membroj en Kanado, iom da statistiko eble interesos vin. Dum kelkaj pasintaj jaroj ĝis nun ni kalkulas 483 membrojn en tut-Kanado. En Kebeko 174, Ontario 146, Brita Kolumbio 49, kaj malpli en aliaj provincoj. Do, Kebeko elstaras en la kelkjara statistiko. Kompreneble ne ĉiuj en la statistiko restis kiel membroj, sed jen ekzemploj de elstaraj nuntempaj kanadaj membroj ekster Kebeko: (Brita Kolumbio) *Yitkon Ho*, ĉina samideano sur Honor-Registro de EANA 15 jarojn. *G.W. MacKenzie*, veterano kiu havas 92 jarojn, iama Reprezentanto de EANA por Kanado. (Manitobo) *S-ino Albert Berney*, Honoro 15 jarojn kiel PATRONO. (Nord-Okcidenta Teritorio) *R.J. Aubrey*, deĵorado en Inuvik. (Nova Skotio) *H. J. Lewis*, jarojn da subteno rilate al libroj, ktp. (Novlando) *Dr. Leon Koen, M.D.*, deĵoras en hospitalo tie. (Ontario) *Vern Bruder*, Honoro 20 jarojn, 10 jarojn kiel PATRONO. *Richard L. Denison*, Honoro 15 jarojn, 11 jarojn kiel PATRONO, *Edward Jackman*, Honoro 15 jarojn, deĵoris iom da tempo en Ghana, Afriko. *Jaan Kubar*, Honoro 15 jarojn, Esperantisto jam 25 jarojn antaŭ membriĝo en EANA. *Yustyn Kuzma*, Honoro 15 jarojn kiel altestimata Veterano. *Paul Larose*, jam 9 jarojn, pasigis la vintron en Nice, Francujo. *André G. O'Reilly*, elstara kolego en EANA, Honoro 20 jarojn, ĉiam kiel PATRONO kun kontribuadoj. Li foje deĵoris por Kanado en Pakistano. (Alberto, Nova Brunsviko, Saskaĉevano) Kelkaj membroj en tiuj provincoj ankaŭ. Manko de spaco permesas nur la ekzemplojn supre. Al ĉiuj en Kebeko kaj kanado ni kore salutas kiel Nord-Amerikaj samideanoj. Sendu pli da novaĵoj por presi poste en "AE".



DEZIRAS KORESPONDI

Anoncoj: Membroj senpage unufoje. Aliaj 4¢ ĉiu vorto aŭ mallongigo (resp. kup. valoras 8¢). Komerca anonco: 10¢ vorto, ripetado 6¢ vorto.

AVERTO: Ni atentigas membrojn kiuj Dez. Kor., ke vi eble ricevos leterojn por varbi vin al tre dubindaj Esperanto-organizoj. Se oni penas influvi vin kontraŭ la aŭtentika amerika asocio EANA (la vera kaj fidinda Esperanto-movado ekde la komenco en 1905), sciigu nin kaj ni konsilos vin.

Argentino. S-ro Hector G. Espinosa, C.C. 95, Suc. 16, Buenos Aires, Argentina, dez. interŝ. let. kaj IPK kun ĉiuj landoj.

Danlando. S-ino Toftum Jensen, Hyldkroggaard, Søvind, Denmark, dez. kor. kun novaj Esperantistoj el multaj landoj.

Islando. S-ro Olafur Kristjansson, Geirakoti Sandvikurhoeppi, Arnessysla, Iceland, (16-j.) dez. kor. kun ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj. Li certe resp. al ĉiuj, ankaŭ al PM kolektantoj.

Italujo. S-ro Romano Bagnis, Saleziani, Pietrasanta (Lucca), Italy, dez. ricevi IPK ĉiulandajn, filatele afrankite.

Svislando. Komuna adreso: Esperanto-Rondo, Heil u. Pflgeanstalt, 9500 Wil, Switzerland. Ok diversaj geesperantistoj dez. kor. poŝtkarte.

Usono. S-ro Gregory P. Eichler, 56 Schuyler Ave., Hayward, Calif. 94544, U.S.A., havas 15 jarojn, dez. kor. kun gejunuloj proksimume samajaj en Sud-Ameriko, pri ĉiuj temoj, sed precipe pri lingvistiko kaj vivo en latin-amerikaj landoj. Mi parolas kaj studas france, hispane, germane, kaj nun Esperante. Sud-Amerikaj ĵurnaloj b.v. kopii.

Usono. Esperanto-Asocio de N.A., 1837 N.E. 49 Ave., Portland, Ore. 97213
Eminenta membro en la usona registaro tre bezonas ekzempleron de la malnova gazeto *LITERATURA MONDO*, jaro 1933, monato januaro. Se vi povas helpi tiurilate, ni pretas pagi sufiĉe grandan sumon per mono, libroj, gazetoj, laŭdezire. B.v. skribi al ni pri ebleco kaj prezo.

Usono. S-ro Brady W. Moore III, R.D. 1, Box 89, Mars, Pa., 16046, U.S.A., prezidanto de Societo de Intelektaj Amikoj, dez. kor. kun gejunuloj 12 ĝis 19 jaraĝaj, kiuj interesiĝas pri metafiziko, filozofio, religio, politiko, lingvistiko, aŭ scienco; korespondado precipe kun aliaj landoj sed leteroj de Usono estas bonvenaj kaj la Societo bonvenigos novajn membrojn.

Usono. S-ro David Spechtold (17-j. junulo), 139 Ulysses St., Pittsburgh, Pa., 15211, USA, dez. kor. kun gejunuloj en Eŭropo – Francujo, Germanujo, ktp. Li ankaŭ havas amikojn (junulojn) kiuj ŝatus korespondi.

Via Vojaĝo al la Kongreso en Tokio aŭ ie ajn en la Mondo

S-ro Louis Small, Esperanto Dept., Trans Global Travel, 6333 Wilshire Blvd., Los Angeles, Calif. 90048, U. S. A., peranto por unu el la plej grandaj vojaĝagentejoj en Kalifornio, perados vian vojaĝon al la Esperanto-Kongreso en Japanujo (31-an julio – 7-an aŭgusto), aŭ ie ajn kaj iam ajn en Usono aŭ eksterlande. Petu detalojn de S-ro Small.

Sperta Traduka Servo – Esperanta-Angla aŭ Angla-Esperanta

ESPERANTO, P.O. Box 213, Monroeville, Pennsylvania, USA. Ni tradukas resumojn, leterojn, artikolojn, librojn, de Esperanta en Anglan aŭ Angla en Esperantan. Teknika, komerca aŭ literatura temoj. Po \$3 por ĉiu 100 vortoj, po \$20 por ĉiu 1000 vortoj. Sperta kaj senerara servo.

POPULAR ESPERANTO BOOKS

The Esperanto Book Service, official book service of EANA, is fully equipped to supply ALL your book needs. Here are a few titles. Write to the address below for complete book lists. Place all your orders with the "Esperanto Book Service."

ESPERANTO FOR BEGINNERS, <i>Butler</i> , easiest concise text, 28 p.....	\$.15
THE ESPERANTO TEACHER, <i>Stuttard</i> , an excel low-cost textbook, 106 p.....	.50
POPULARA LERNOLIBRO, <i>Kokeny</i> , LEARNER'S AID, <i>Dodge</i> , excel set 2 bks:	
Best easy graded <i>Reader</i> , and <i>English Key & Guide to Grammar</i> , 106 p. SET	.70
ESSENTIAL ESPERANTO, <i>Gething</i> , good new standard textbook, 128 p..Cloth	2.50
STEP BY STEP IN ESPERANTO, <i>Butler</i> , easy "non-gram. method", 280 p. Cloth	1.85
ESPERANTO: THE WORLD INTERLANGUAGE, <i>Connor-Solzbacher-Kao</i> , best,	
"6bks-in-1", history, textbook, reader, directory, 2 dict. 245 p.....Cloth	3.50
NIXON ESPERANTO VOCABULARY, Eng-Esp & Esp-Eng, beginner dict. 178 p.	.75
EDINBURGH DICTIONARY, Esp-Eng & Eng-Esp, best handy dict. 300 p..Cloth	1.50
MILLIDGE DICTIONARY, Esperanto-English, best BIG Esp-Eng, 509 p..Cloth	2.50
FULCHER & LONG DICT, English-Esperanto, best BIG Eng-Esp, 352 p..Cloth	3.35
PLENA VORTARO DE ESP, all-Esp, with 'Suplemento', complete, 584 p..Cloth	4.35
TALKING YOUR WAY AROUND THE WORLD, <i>Prof. Pei</i> , account in Eng, 224 p.	.50
ONE LANGUAGE FOR THE WORLD, <i>Prof. Pei</i> , "how to achieve it", 307 p.Cloth	5.00
WORLD'S CHIEF LANGUAGES, <i>Prof. Pei</i> , all langs, incl. Esp. 663 p.....Cloth	6.75
SAY IT IN ESPERANTO, <i>Connor</i> , Eng & Esp, 1000 modern Esp phrases, 160 p.	.75
NAŬLINGVA ETIMOLOGIA LEKSIKONO, <i>Bastien</i> , Esp & 8 langs, 334 p..Cloth	2.35
FUNDAMENTA KRESTOMATIO, <i>Zamenhof</i> , basic Esp vol, 442 p....Deluxe BD	3.50
LINGVO KAJ VIVO, <i>Waringhien</i> , "Esperantologiaj Eseoj", must, 452 p....Cloth	4.80
PLANLINGVAJ PROBLEMOJ, <i>Gilbert</i> , compares Esp. with "projects", 100 p.	1.25
ORA LIBRO DE ESP. MOVADO, richly illust. bk of 1st 50 yrs of Esp, 240 p....	1.75
ESPERANTISMO, <i>Braga</i> , Esp miscellany, topics in best Esp style, 32 p.....	.25
VIVO DE ZAMENHOF, <i>Privat</i> , remarkable story of his life, illust, 133 p..Cloth	1.15
LA SANKTA BIBLIO, "The best reader", bound in art vellum, 996 p.....Cloth	2.50
ESPERO INTERNACIA, 240 religious songs, full music notes, 230 p..Card BD	.75
KARLO, <i>Privat</i> , very popular easy first reader, life of young man, 47 p.....	.30
ESPERANTO-SORTIMENTO, good reading at low cost, 5 books, reg. 30¢ each:	
Akrobato, <i>Blanche</i> , <i>Argenta Akvo</i> , <i>Miserere</i> , <i>Thais</i> , <i>Rozujo</i> , over 200 p.....	1.00
TRI HOMOJ EN BOATO, <i>Jerome</i> , popular, easy, amusing, big novel, 258 p.....	1.50
PROVERBARO ESPERANTA, <i>Zamenhof</i> , with a full analytical index, 167 p....	1.70
MARIA KAJ LA GRUPO, <i>Emba</i> , excel orig novel re Marie & Esp Club, 172 p...	.85
MUZIK-NOTOJ, <i>Bagby & Kalocsay</i> , 10 songs, words & music complete, 34 p...	.35
ROMAJ ELEGIOJ & LA TAGLIBRO, <i>Goethe</i> (<i>Kalocsay</i>), amatory poems, 80 p..	.65
SVISA ANTOLOGIO, ed. <i>Bauer</i> , from 4 langs, top best anthology, BIG 540 p...	3.95
AMO EN LA JARO DEKMIL, <i>Elola</i> , novel, love's hidden power, 351 p....Bound	1.25
ANSTATAŬA EDZINO, <i>Maxwell</i> , novel, love intrigue & escape, 212 p....Bound	1.15
ALASKA STAFETO (& <i>Kaptitaj de la Glacimokoj</i>), <i>Omelka</i> , excel, 96 p....Cloth	1.15
GÖSTA BERLING, <i>Lagerlöf</i> , exciting famed Swedish classic, 552 p.....Cloth	3.50
LA MARVIRINETO, <i>Andersen's</i> fairy tale, deluxe illust LARGE, 78 big p.Cloth	2.40
LA VERDA RAKETO, <i>Forge</i> , 9 orig novels, some re Esperanto, 150 p.....Cloth	2.40
PORINFANA SERIO, 10 most beautiful illust. children's books, each 16 p.....	2.50
SET OF 20 RARE KEYS, unique large rare set of 20 different languages.....	3.00
YEARLY COLLECTIONS "AMERIKA ESPERANTISTO", complete, beginning	
1944 to and including 1961 (except '48 and '59). Choose any 1 year, \$1.50;	
3 or more years, ea. \$1.00; ALL 16 years complete since publication began,	
ea. 75¢ (only \$12 for ALL). Magazines shipped fr. EANA office, Portland....	12.00
ENAMEL GREEN STAR, Esperanto insignia - button, brooch or tie pin, each..	.50
INDIAN BEAD STAR, truly a real 'jewel', orig \$1, 1 1/4" dia, safety catch.....	.85
ESPERANTO PENNANT, quality felt with Star & "Esperanto", 9" long 4" base	.30

**Esperanto Book Service, Williamsburg P.O. Box 315,
Brooklyn, New York 11211**

"SAY IT IN ESPERANTO"

by G. Alan and Doris T. Connor

Tells You What to Say and How to Say it!

You'll be delighted by the ease with which you'll immediately be saying whole phrases in Esperanto. Practice ordering meals, renting rooms, driving a car, going to a doctor, going shopping, etc., by using this handy manual.

5 ¼ x 3 ½ in. for purse or pocket. Over 1000 phrases, many never before translated into Esperanto. A complete index with unique numbering system so that you find the phrase you want instantly. A quality product with strong covers and sewn back. A guide to conversation, with summary of grammar. Useful in Esperanto courses.



only
75¢

It is a thoughtful, useful gift for friends, too!

Those who receive it will find much interest in learning to say useful phrases in Esperanto; and will want to go on to a mastery of the interlanguage. Order them in quantity!

Price only 75¢ each, discounts to groups & dealers.

Published by Dover Publications, Inc. Order from EANA.

LINGUAPHONE HOME STUDY COURSES

You can learn *ESPERANTO*, or any other language listed below, by the world-renowned *Linguaphone* Ear-Eye Method. Order through the *Esperanto Ass'n of N.A.* for benefits to both yourself and your Esperanto Central Office. You may select:

Esperanto	Russian	Swedish	Persian
Italian	Finnish	Hebrew	Hausa
Irish	Arabic	Bengali	Spanish
Polish	Japanese	Greek	Dutch
Chinese	Latin	German	Afrikaans
Malay	French	Czech	Hindustani
English	Portuguese	Norwegian	Effik

Regular list price for *Esperanto*, complete course, is \$57.50. Most other languages are priced the same. A few higher, a few lower – dependent upon number of records and other factors. Write to *Esperanto Ass'n of N.A.* about any language in which you are interested. **Special payments** for members of EANA.

Esperanto Ass'n of N.A., 1837 N.E. 49 Ave., Portland 13, Ore.